S-ano H. D. BORILO

**PILO-PRESS** la plej aktiva aŭskultanto de radio-elsendoj! Legu sur p.4.

Internacia Informservo

N-ro 17/77 - 25 aprilo 1977
Aperas ĉiusemajne

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

## Internacia lernejo kadre de ILEI-eksperimento

Saint Gerard (pp) - De la 14-a ĝis la 22-a de majo (lerneja tempo) okazos en la kadro de ILEI-eksperimento (Dua Regiono) Internacia Lernejo en Saint Gerard, Belgujo, en kiu partoprenos 3 klasoj el Nederlando, 2 klasoj el Francujo, 1 klaso el Belgujo kaj 3 klasoj el Federacia Respubliko Germanujo (Malsupra Saksujo). Bedaŭrinde klaso(j) el Grekujo, kiu ankaŭ partoprenas en la eksperimento, ne povas veni al tiu Internacia Lernejo.

La Internacia Lernejo celas demonstri, ke lernantoj povas esti instruataj en diversaj fakoj per Esperanto. La fakoj, en kiuj oni instruos la lernantojn, estas:

Matematiko, Geografio, Muziko, Desegnado, Sporto kaj Esperanto.

Krome oni antaŭvidas "eŭropan fakon", en kiu oni prezentu kaj diskutigu unu ideon de Eŭropo. Oni esperas, ke el tiu "eŭropa fako" rezultos komuna letero (rezolucio) de la infanoj al la diversaj eŭropaj instancoj.

Pri la aranĝo respondecas: Esperanto-Lerneja-Eksperimento, II-a regiono de ILEI, Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-3150 Peine, F R Germanujo.

## Esperanto - La eklezia lingvo de la estonteco?

## Nova sukceso de Trixini

Ehringerfeld (pp) - En Ehringerfeld ĉe Paderborn okazis post Pasko la kunveno de la tre konata katolika familia asocio N D. La partoprenintoj venis el la tuta Federacia Respubliko Germanujo. Pastro Kindler-Triksini el Luksemburgo prelegis pri "Esperanto - la eklezia lingvo de la estonteco?". Pli ol 150 personoj, ĉiuj universitataj studintoj, ĉeestis, ankaŭ gesamideanoj el Paderborn, inter ili d-ro Kasselmann. Triksini aranĝis grandan Esperanto-libro-ekspozicion kaj disdonis interesajn informilojn. Dum tuta semajno en la kunvenejo staris granda tabulo kun afiŝoj pri kaj en Esperanto kaj stando kun varbmaterialo.

La prelego komenciĝis je la 8-a, sed ĉiuj restis ĝis la 11,30 horo, diskutante. Poste la profesoroj por la angla kaj latina lingvoj, la kuracistoj, advokatoj ktp. asertis ke ili ne havas plu argumentojn kontraŭ la avantaĝojn de la internacia lingvo.

Triksini kunprenis tri listojn plenaj da nomoj kaj adresoj. Ĉiuj subskribintoj serioze interesiĝas pri Esperanto, ili volas lerni la lingvon. Triksini volas prelegi ankaŭ en ties hejmurboj kaj komencigi kursojn, kio fakte jam okazas en aliaj urboj, kie li antaŭe prelegis, i.a. en Weinheim aŭ baldaŭ en Koblenz, kie sin anoncis jam 20 interesuloj por kurso, laŭ informo de d-ro J. Kondor.

Pastro Kindler dum tiu postpaska tempo ankaŭ kunpreparis la kongreson kiu okazos pentekoste en Paderborn. Li rigardis la belan herbejon kie li celebros la festan Esperanto-diservon kaj la "Paderhalle" kie Triksini montros la magian programon en la interncia lingvo.

Venu do al Paderborn, al la Eŭropa Esperanto-Kongreso kaj vi ekscios kaj spertos kiu kaj kio estas Triksini!

**Ausstellung in Schwabmünchen:**

# Zur Begrüßung spricht auch der Bürgermeister Esperanto

**Plakate, Bücher und Probelektionen werben für die künstliche Sprache**

Ekspozicio, seminarieto kaj labora kunsido

Kunveno de Bavara Esperanto-Ligo

Schwabmünchen (pp) - En Schwabmünchen, malgranda urbo sude de Augsburg, Esperanto jam de kelkaj jaroj ne plu estas nekonata afero, dank' al la sukcesa agado de Gerald Tucker en la tiea "Gesamtschule" (Tuteca Lernejo). Tiun ĝojigan fakton konstatis ankaŭ la urbestro de Schwabmünchen, FRANZ STAPFER, kiu oficiale malfermis la Esperanto-ekspozicion, sabate, la 23-an de aprilo, je la 10a horo, en la Elementa Lernejo de tiu urbo. Ke la urbestro de Schwabmünchen vere simpatias al Esperanto, orelfrape pruvis la fakto, ke li enkonduke al sia malferma parolado la ĉeestantojn salutis en Esperanto. Li konfesis, ke ne estis malfacile lerni ĉi tiun mallongan salutparoladon en Esperanto.

Malgraŭ la nefavora vetero, pluva kaj ŝtorma, la ekspozicio vekis intereson inter la enloĝantoj, speciale ankaŭ dank' al la pozitiva kaj ampleksa raportado fare de la loka gazeto "Schwabmünchner Allgemeine", kiu ankaŭ post la aranĝo, lunde la 26-an de aprilo, publikigis artikolon ilustritan kun la supre kopiita surskribo "Salute la urbestro ankaŭ parolas Esperanton". Dum la ekspozicio okazis tri provlecionoj kun ĉ. 20 partoprenantoj.

Sabate posttagmeze okazis la laborkunsido de Bavara Esperanto-Ligo sub la gvido de ligo-estro Hermann Schmid. Ĉeestis 30 liganoj el tuta Bavario, de Bamberg, Würzburg, Lichtenfels, Nürnberg, München, Augsburg. La venonta kunveno de Bavara Esperanto-Ligo havos lokon en Lichtenfels, en norda Bavario, la 2-an de oktobro.

Tradicia ero de la bavaraj kunvenoj jam estas seminarieto pri problemoj de Esperanto-instruado, organizata de Gerald Tucker, fakestro pri ekzamenoj de GEI. La ĉi-foja temo estis la "Metodiko de la Esperanto-instruado", kiu okazis en lerneja ĉambro de la moderne ekipita Gesamtschule, kie Gerald Tucker instruas la anglan lingvon kaj - laŭ libervola bazo - Esperanton. Speciale interesa estis la demonstrado de modernaj instruhelpiloj, kiaj ja bedaŭrinde ankoraŭ mankas por la Esperanto-instruado.

Gerald Tucker volas daŭrigi tiujn seminariojn -eble en pli granda kadro kadre de nacia kongreso -, la temo de la venonta aranĝo estos:

Esperanto-instruado al miksita (heterogena) celgrupo, plenkreskuloj ekde la 15-a vivojaro, laborista-dungita. La ĉefcelo de la komencanta kurso estu baldaŭa konversaci-kapablo. La traktotaj temoj estas: 1) Skribo, 2) Libro, 3) Ekzercoj, hejmtaskoj, 4) Laboriloj.

Ke la aranĝo en Schwabmünchen, ekspozicio, kunveno, seminario, bone sukcesis, oni ĉefe dankŝuldas al Gerald Tucker kaj lia "ĉarma edzino" kiel diris urbestro Stapfer, kaj ges-roj Schmid.
Tamen specialan dankon meritas la urbo Schwabmünchen, la urbestro, la lernejaj instancoj, la distrikta popolaltlernejo, kiu ja estis kunaranĝinto kaj presis kaj distribuis afiŝojn kaj informilojn. Schwabmünchen certe ankaŭ estonte ludos rolon en la bavara Esperanto-vivo!

Elfried Kruse emeritiĝos

Ni atentigas niajn legantojn, ke la sekretariino de IFEF kaj ekssekretariino de GEFA, s-ino Elfriede Kruse, emeritiĝos la 31-an de julio 1977. Korespondaĵojn bonvolu nun ekskluzive sendi al ŝia hejma adreso: Wiener Strasse 121, D-6000 Frankfurt/Main 70.

## Konferenco pri Informado

Gdansko (pp) - La Informa Servo de Pola Esperanto-Asocio sciigas: La 2-an kaj 3-an de aprilo okazis en Gdansko tutpollanda konferenco pri la informado, organizita de la komisiono pri la informado de la Pola Esperanto-Asocio (PEA). Partoprenis 50 esperantistaj informantoj el diversaj lokoj de la lando.

La konferencon, kies ĉeftemo rilatis al la informado sur la loka ŝtupo - tiu de la rondo de PEA - enkondukis prelego de Tomas Bedyński pri "Prakseologio en la Esperanto-movado". Sekvis prelego de Jadwiga Greger pri teoriaj aspektoj de la informado en la praktiko de PEA. Post tiuj ĉi prelegoj disvolviĝis sub la gvido de redaktoro A. Pettyn tre vigla diskuto, kiu daŭris en ambaŭ tagoj - 8 horojn. Unue oni priparolis la porinforman utiligon de la neperiodaj publikaĵoj, kiel libroj, broŝuroj, flugfolioj, ekspozicioj afiŝoj ktp. Oni aparte akcentis la bezonon de plivastigo de la perbilda informado kaj tre varme oni bonvenigis la novan iniciaton de la komisiono pri la informado, nome pri la "Foto-Servo de PEA", kies unua serio jam aperis kaj estas dediĉita al la "Semajno de Internacia Amikeco". Foto-serioj pri diversaj temoj bildigantaj la praktikan utiligon de Esperanto en Pollando kaj en la mondo estos plej verŝajne eldonataj kvar fojojn jare. Se temas pri ekspozicioj, oni planas aranĝi kelkajn laŭtemajn, ekz. "Esperanto en turismo", "Esperanto en literaturo", kaj oni cirkuligos ilin tra la lokaj grupoj de la tuta lando. Oni decidis prilabori kaj disponigi al lokaj grupoj - rondoj de PEA - ni hvas nun tiajn 119 en Pollando - diversajn novajn informilojn kaj flugfoliojn.

Multe da atento oni dediĉis al la porinforma utiligo de diversaj allogaj formoj, kiel kvizoj kaj konkursoj kun premioj. La kunlaboro kun lokaj radiostacioj kaj televid-stacioj kaj ankaŭ kun lokaj gazetoj vekis tre viglan diskuton kaj interŝanĝon de sperto. Montriĝis, ke ĉiam pli vaste oni utiligas por tiaj informaj celoj la lokajn fabrikajn gazetojn, kiel bonan ekzemplon oni menciis "Głos Zamechu", aperantan en Elblag.

Tre interesajn ideojn oni prezentis en kunligo kun la temo koncernanta la kunlaboron kun lokaj regionaj kulturaj societoj kaj ties utiligon por la informado. Ne mankis ankaŭ interŝanĝo de spertoj pri la utiligo de prelegoj. Tamen oni multfoje substrekis, ke pli valora estas la t.n. nerekta informado, dum kiu Esperanto fariĝas instrumento por informado pri neesperantaj demandoj.

Kompreneble dum tia forumo pri la informado naskiĝis novaj valoraj ideoj, inter kiuj apud la Foto-Servo, jam menciita, oni planas serion de magnetofonaj surbendigoj, kiuj helpos la lokajn informantojn. La unua estos preta ankoraŭ en aprilo kaj enhavos inter aliaj eldiron pri E-o de la ne plu vivanta eminenta pola lingvisto, prof. Zenon Klemensiewicz, kanzonojn, fragmenton de radio-elsendo kaj viglan sportan raportadon.

Sumigante oni devas substreki, ke ĉi tiu unua interŝanĝo de spertoj pri la informado montriĝis ege valora kaj oni daŭrigos ĝin aŭtune. Krome oni povis konatiĝi kun diversaj informiloj, i.a. el F R Germanio (de Ludwig Pickel) kaj el Finnlando.

## Nova prospekto pri salutkartoj de UNICEF

UNICEF-Laborgrupo Sylt informas: Ĵus aperis la nova prospekto pri la printempaj kaj someraj salutkartoj de UNICEF. Ĝi estas havebla senkoste ĉe UNICEF-Sylt, Bastianstr. 8, D-2280 Westerland/Sylt.

Ĉiuj, kiuj aĉetas UNICEF-salutkartojn, helpas al infanoj en mizero tutmonde.

PILO-PRESS, ĉiusemajna internacia informservo. Jara abonkotizo 30 GM.

Bonvolu pagi al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851.

Feriopropono j '77

Por gejunuloj, kiuj intencas pasigi senkostan libertempon en internacia rondo, samtempe farante komunutilan laboron, pere de IGB, prezentiĝas unika ŝanco.

IBG estas organizo por internaciaj renkontiĝoj de gejunuloj inter 18 kaj 30 jaroj kun komunutilaj servoj en pluraj landoj. La renkontiĝoj ebligas al la junularo el la plej diversaj landoj, komune laborante, loĝante kaj pasigante libertempajn aranĝojn, reciprokan interkompreniĝon kaj la interŝanĝon de opinioj kaj aspektoj. Kiel rekompencon por la laboroj (konstruo de infanludejoj, migradvojoj aŭ sportejoj kaj aliaj projektoj) la partoprenantoj ĝuas senkostajn loĝadon, nutraĵon kaj libertempajn aranĝojn.

IGB estas membro en la Coordinating Committee for International Voluntary Service of UNESCO (koordina komitato por internaciaj libervolaj servoj de UNESKO).

Pliajn informojn kaj anoncojn ĉe: IBG Internationale Begegnung in Gemeinschaftsdiensten, Hauptstr. 64, D-7252 Weil der Stadt-Merklingen, F R Germanio.

Informis: Johann A. Pachter, Vöttinger Str. 49, SWH-Zi.54/Haus IV, D-8050 Freising 11




la plej aktiva aŭskultanto

La plej aktiva aŭskultanto

Samideano Hans Dietrich Borilo sendube estas la plej aktiva kaj fidela aŭskultanto de la Esperanto-elsendoj de Pola Radio. Li eĉ aŭskultas la posttagmezajn programojn dum la ŝtreĉa profesia laboro..! (Vidu maldekstran bildon!).

Parenteze dirite li apartenas al tiuj aŭskultantoj, kiuj plej malmulte plendas pri fadoj kaj bruo en la etero. Admirinda persisteco!

Kiel li konfesis al la PP-reportero, kiu lin vizitis dum la labortempo, li sendas al Pola Radio ĉiutage, escepte de la semajnfinoj, unu poŝtkarton kun konfirmo de la aŭskultado.

Kompreneble li aŭskultas regule ankaŭ al la aliaj Esperanto-elsendoj!

**********************

Varsovia statistiko

Dum la monato marto 1977 la Esperanto Redakcio de Pola Radio ricevis 405 korespondaĵojn. Venis el Federacia Respubliko Germanio 81, Sovetunio 62, Ĉeĥoslovakio 50, Hungario 40, Germana Demokratia Respubliko 34, Britio 28, Finnlando 25, Nederlando 19, Francio 18. La plej skribema aŭskultanto en marto estis Ernst Höpfler, Lippstadt, F R Germanio.

Ŝanĝo en la svisaj elsendoj

Ekde la 2-a de majo 1977 la tagmezaj elsendoj je la 13,20 horo okazos vespere je la 19,00 - 19,10 h. La ondoj restas la samaj. Svisa Kurtonda Radio cetere ĵus dissendis novan programinformilon en Esperanto. Petu ĝin de Svisa Kurtonda Radio, Esperanto, CH-3000 Bern 15.

La Esperanto-Informoj de ORF Regional, ĉiuĵaŭde, je la 18,50 horo estas bonege aŭdeblaj, sur meza ondo. Bedaŭrinde revuo Esperanto kaj Heroldo de Esperanto ĉiam ankoraŭ mencias en sia Esperanto-programo la malĝustan tagon kaj horon!